

Heinrich Heine, Im Mai	Heinrich Heine, En Majo	Heinrich Heine, En la mirinda bela Maj'	Heinrich Heine, En dolĉega Maj'	Heinrich Heine, En admirinde bela maj'
	<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	<i>tradukita de Kálmán Ka- locsay</i>	<i>tradukita de Fried- rich Pillath</i>	<i>tradukita de Hans-Georg Kaiser</i>
Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Knospen sprangen, Da ist in meinem Herzen Die Liebe aufgegan- gen.	En Majo, kiam ĉiuj Burĝonoj mal- fermiĝis, La amo kiel floro En mia kor' estiĝis.	En la mirinda bela Maj', dum sin burĝonoj fendis, en mia kor' la amon mi disvolviĝi sentis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum la burĝonoj krevis, El mia koro ĝerme Amsento sin ekle- vis.	En admirinde be- la maj', dum jam burĝonoj krevis, jen ankaŭ miako- re la amo sin ekle- vis.
Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Vöglein san- gen, Da hab' ich ihr ge- standen Mein Sehnen und Verlangen.	En Majo, kiam ĉiuj Birdetoj sin aŭdigis, Al ŝi deziron mian Sopiran mi sci- igis.	En la mirinda bela Maj', dum birda tril' ne ĉesis, al ŝi sopiron mi- an konfide mi kon- fesis.	Printempe en dolĉega Maj', Dum birda kanto sonis, De l' kora mi sopi- ro Konfeson al ŝi do- nis.	En admirinde be- la maj', dum birdotril' senbridis, jen mi al ŝi sopi- rojn, dezirojn, ekkonfi- dis.
...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.

Traduko de la Germana poemo „Im Mai“ de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLA-VO (Manfred Retzlaff, Stetiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-11-14.

MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.

Traduko de la Germana poemo „Im Mai“ de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)

Traduko de la Germana poemo „Im Mai“ de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en *Elektitaj Poemoj*, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.

Traduko de la Germana poemo „Im Mai“ de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).

Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.